

Usona Esperantisto № 2020:2 (mar-apr)

Announcements

Raporto de la Nomuma Komitato; Literatura konkurso "Hristo Gorov-Hrima"; Poezia konkurso "Poezio el ĉiuj ĉieloj"; Premio Paul Gubbins de Monato; Aliĝu al Internacia Jurista E-Asocio; Montreala UK prokrastita al 2022; numeroj de revuo *Esperanto* libere elŝuteblaj; New issues of *Information for Interlinguists / Informilo por Interlingvistoj*; Get the latest articles as soon as they appear

Letero al D-ro Zamenhof

de la prezidanto • Filipo DORCAS
Kara Doktoro Zamenhof, Saluton al vi el la jaro 2020.

De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Get to Know a Fund

de la estraro • Jordon KALILICH
Information about the Goldman Educational Fund.

Kiel nomi tiun viruson?

facila teksto
Ĝi estas preskaŭ ĉio, pri kio ni parolas dum monatoj. Sed kiel, precize, nomi ĝin en Esperanto? Ĉu *koronaviruso*, *koronaviruso*, aŭ *kronviruso*?

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK
La oka en serio de bildstrioj danke al Timoteo BORONCZYK.

Ne forgesu mian voĉon

libroj
Nova libro de Julian MODEST kun du freŝaj noveloj.

"Inversa" tradukado povas esti surprize defia


traduku! • Hoss FIROOZANIA
Oni povus supozi, ke estas pli malfacile traduki el la angla en Esperanton, ol inverse. Sed ne nepre.

Ĉio (card game)

el la arĥivo
An Esperanto card game from 1908. "Prizes awarded to those who have the most diseases."

Lekato

senintenca esperantaĵo • Hoss FIROOZANIA
Sed ĉu ĝi estas akvoimuna?



Announcements

Raporto de la Nomuma Komitato

Laŭ la statutoj de Esperanto-USA, mi plusendas tiun raporton de la Nomuma Komitato.

La komitato elektis la jenajn homojn por la balotado ĉi-somere:

- Prezidanto: Filipino DORCAS
- Vicprezidanto: Chloe EVERHART, Alex MILLER
- Direktoroj: Chris JOHNSON, Tim RICE, Hoss FIROOZNIJA

La komitato ricevis neniun petskribon de la membraro kiu nomumus aliajn kandidatojn.

— Marcus GRIEP, Estro de la Nomuma Komitato

Literatura konkurso *Hristo Gorov – Hrima*

Hristo GOROV – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por **rakonto** kaj **eseo**.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon.

La verkoj estu tajpita komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. Aŭtoro indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefonnumero kaj retpoŝtadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato



A4, la tiparo estu *Times New Roman*, 12-punkta.

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn. Bonvolu sendi kontribuojn ĝis la 30-a de Septembro 2020 rete al modest@abv.bg aŭ poŝte al: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, “Vrabnica” 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

Literatura konkurso *Poezio el ĉiuj ĉieloj*

La organizo Sicilia Esperantista okazigas la konkurson *Poezio el ĉiuj ĉieloj*, pri poemoj en Esperanto kaj la itala lingvo. Bonvenaj estas poemoj de ajna temo, kaj ĉiuj rajtas partopreni.

La versaĵoj povos alveni en la itala lingvo, en Esperanto, aŭ en ambaŭ lingvoj. Partoprenantoj sendu nur unu poeziaĵon ne pli longa ol 50 (kvindek) versojn entute, kune kun aliĝilo (vidu sube) al samideano@hotmail.it. Verkoj devos alveni antaŭ la 31-a de Aŭgusto, 2020.

En la retejo de Sicilia Esperantista troviĝas **aliĝilo kaj pliaj detaloj pri la konkurso**

<<https://bit.ly/3b0mbC2>>.

Konkurso por nova ĵurnalisma talento

Okaze de la 40-jara ekzisto de la gazeto *Monato*, kaj por memori sian forpasintan ĉefredaktoron Paul GUBBINS, la revuo starigis la Premion Paul Gubbins por Nova Talento. Ĉiujare, kaj tiel longe ke restos mono en la fonduso kreita pro tiu ĉi celo, estos aljuĝataj ĉefpremio de 250 eŭroj, dua kaj tria premioj de 100 eŭroj kaj sep senpagaj abonoj de *Monato*.

Povas partopreni ĉiu persono, kiu bone regas



Esperanton kaj kiu ne verkis por *Monato* en la lastaj kvin jaroj. Por partopreni la kandidatoj sendu tekston de minimume 500 kaj maksimume 2500 vortoj al nova_talento@monato.be.

La temoj, inter kiuj la kandidatoj povas elekti, estas:

- La politiko, vivo, turismo aŭ historio de sia lando aŭ regiono
- Ekonomio
- Komputado
- Scienco
- Medio kaj ekologio
- Lingvo

La redaktoroj decidis, surbaze de la lingva kaj ĵurnalisma talentoj de la aŭtoroj, kiuj artikoloj aperos en *Monato*. El tiuj la ĵurio, konsistanta el redaktoroj kaj eksteruloj, elektos ĉiujare la dek plej bonajn kaj atribuos al ilia aŭtoro la premiojn.

Por pli da informo, vidu **la kompletan regularon** <https://www.monato.be/nova_talento.php>.

Internacia Jurista E-Asocio (IJEa)

Se vi estas advokato, juĝisto, prokuroro, notario, jurstatuskonservejestro, jurprofesoro aŭ alispeca juristo, bonvolu konsideri aliĝi al IJEa, la Internacia Jurista E-Asocio.



Por pli da informo, bonvolu kontakti prezidanton Miguel Faria de Bastos ĉe mfb@debastosadvogados.com.

UK en Montrealo prokrastita

Post zorga konsiderado de ĉiuj aspektoj de la koronavirusa tutmonda epidemio kaj ĝiaj sekvoj, la Estraro de UEA, la Centra Oficejo, LKK kaj la kongresejo en Montrealo venis al la konkludo, ke tute ne estus sekure kaj prudente okazigi la UK-on en Montrealo en 2020. Cetere, laŭ la striktaj reguloj de



la kebekia registaro, ne eblos okazigi Universalan Kongreson de Esperanto.


Pro tio la Estraro de UEA unuanime decidis prokrasti la Universalan Kongreson en Montrealo al la jaro 2022.

Ni kore dankas al la Loka Kongresa Komitato (LKK), kiu dum jaroj obstine laboris por organizi la Kongreson kaj pretas daŭrigi la laborojn por la UK en Montrealo en la jaro 2022.

Por ke la esperantistoj tamen havu la okazon sperti grandan internacian aranĝon en tiu ĉi jaro, estas planata virtuala evento en la monatoj Julio-Aŭgusto, kiun povos partopreni ankaŭ tiuj, kiuj ne planis veni al Montrealo.

Jarkolektoj de la revuo Esperanto elŝuteblaj

UEA informas, ke aldone al la libera elŝuteblo de la n-ro 4/2020 de la revuo *Esperanto*, ankaŭ eblas libere elŝuti ĉiujn jarkolektojn kaj numerojn de pli ol antaŭ unu jaro disponeblajn en la **retejo de UEA** <<https://uea.org/revuoj>>.



La retejo nuntempe provizas la jarkolektojn ekde 2002. Por elŝuti la liberajn numerojn oni devas alklaki la butonon **Elŝutu la numeron**. Ne necesas ensaluti por numeroj de pli ol antaŭ unu jaro: tuj post la klako la retejo postulos nur kontrolkodon por permesi al vi elŝuti la elektitan numeron. Por la jarkolekto 2019 elŝuteblas nuntempe de la januara ĝis la marta numero. Por la jarkolekto 2020 eblas elŝuti la aprilan numeron de 2020.

Ĉiuj voĉlegitaj numeroj de antaŭ pli ol unu jaro estas same **libere aŭskuteblaj** <<https://uea.org/revuoj/sono>> – kune kun la voĉlegita aprila numero de 2020.

Information for Interlinguists

New issues of the journal *Informilo* por

Interlingvistoj (IpI) and *Information for Interlinguists* (IfI, the English translation) are available.



IfI/IpI covers news from the fields of planned languages, interlinguistics, and language planning: events, new publications, conference reports, and more. The journal is available for free online in both

Esperanto <<https://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/>> and **English**

<<https://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/>>.

Get the latest articles as soon as they appear

Usona Esperantisto is primarily a web publication, with new articles appearing online as soon as they're edited. Six times per year, we take the previous two months' worth of articles and lump them together into a PDF file for our members who prefer print.



As a result, if you read the newsletter in print (or if you wait to download the PDF file), you aren't getting the freshest news. In fact, you may have even noticed stale announcements of past events, or deadlines that have already come and gone. If you have access to the Internet, however, you have better options:

- As always, you can find the latest articles (and a lot of older ones, too) in our online archive, (Click **Newsletter** on our website) where you can also search and sort by column and author.
- Starting in 2020 we've begun linking to the latest articles each day on our home page.
- You can also get daily updates on our social media pages in **Facebook** <<https://facebook.com/esperantousa>>, **Twitter** <<https://twitter.com/esperantousa>>, and **Reddit** <<https://reddit.com/r/EsperantoUSA>>.
- We have RSS feeds in our archive for new articles, for new announcements (excluding longer articles), and for new additions to our collection of back issues scanned from print.

If you're not familiar with RSS, it's a great way to keep up with changes across multiple websites without having to manually visit each one of them repeatedly. You just "subscribe" to a feed in your RSS reader, and it notifies you each time a new article appears. One free and popular RSS reader you may want to try is **Feedly** <<https://feedly.com>>. You can use it to stay up to date not only with *Usona Esperantisto*, but with your favorite newspapers and blogs, too.

Letero al D-ro Zamenhof

de la prezidanto • Filipo DORCAS

La 14-an de Aprilo, 2020

Kara Doktoro Zamenhof,

Saluton al vi el la jaro 2020. Nome de Esperanto-USA ni tutkore salutas vin kaj dankas vin pro via bonkora donaco al la mondo. Dankon por donaci al la mondo la genian lingvon, kaj dankon por viaj bondeziroj pri nia bonfarto. Ni klopodas per ĉi tiu letero iom respondi al vi pri nia ĝenerala stato kaj pri la stato de la movado.

Ni raportas al vi ke milionoj da homoj parolas Esperanton kaj ke la Esperanto-parolantoj troviĝas en preskaŭ ĉiu lando de la mondo. Tamen ni iom hezitas tiel respondi pri la movado, ĉar la mondo nun troviĝas en stranga, nova situacio. Pro grandskala kaj danĝera malsano preskaŭ ĉiuj en la mondo zorgas pri tre transdonebla malsano. La sanspertuloj kaj la registaroj je pluraj niveloj rekomendas, ke ni fizike apartigu nin unu for de la aliaj por gardi kontraŭ disvastigado de la malsano. Ĉi tio rompas niajn kutimajn rutinojn por laboro, por sociaj kunvenoj kaj eĉ por la paŝoj por antaŭenpuŝi la movadon.

Tamen, malgraŭ ĉi tiuj defioj, ni trovas novajn manierojn kunlabori. Ni laboras senlace por rompi la barojn, kiuj disigas nin. Ni havas modernajn ilojn de komunikado, kiuj penetras ĉi tiujn barojn. Ŝajnas, ke ni magie kunvenas, kvankam ni estas disigitaj. Ĉi tiuj novaj iloj estas disponeblaj al ni jam kelkajn jarojn, sed pro ĉi tiu mizera malsano ni nun devige uzas ilin por nia pli granda avantaĝo.

Ni memoras vian viziton al Usono antaŭ cent dek jaroj. Ni memoras vian tre amikan saluton al ni, kaj viajn korajn vortojn pri paco kaj libereco. Viaj bondeziroj restas antaŭ ni en niaj planoj. La mondo havas novan grandan organizon, La Unuiĝintaj Nacioj, kiu klopodas helpi la homojn kaj la landojn vivi en paco kaj bonstato. Precize ĉi tiun jaron ni

festas la 75-an datrevenon de la UN. Ni havas la tridek punktojn de homaj rajtoj, kaj la dek sep celojn de daŭripova evoluigo.


Ĉu vi povas imagi mondon sen malsato? Sen malsano? Sen malegaleco? Tiuj celoj estas tiom grandaj, ke la kunlaboro devigas nin doni tujan, urĝan atenton. Tamen, tion ni faras, por la homaro per nia granda rondo familia.

En la pasinta jarcento pro kelkaj diktatoroj, nia granda rondo familia suferis grandskale en kelkaj tenebraj punktoj de mondhistorio; sed ni nun staras ĉe nova sojlo kiam ni eniras ĉi tiun novan epokon. Ni estas kune, tamen aparte. Ni parolas unu al la alia tra la bariloj. Ni kunlaboras, kune sed malkune. Tiu paradokso funkcias, kaj ĝi funkcias bone por tiuj, kiuj zorgas unu pri la alia, por tiuj, kiuj zorgas pri la mondo.

Ni fartas bone en ĉi tiu nuna freneza mondo, kaj tiu bonfarto okazas por la samideanoj en etoso de internacia amikeco, danke al via tutkora donaco al la mondo. Dankon al vi, kreinto de Esperanto.

Amike,

Filipo, nome de Esperanto-USA



Filipo DORCAS

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

De la estraro

Frenezaj monatoj

Charlotte estas Sekretario de E-USA. Oni povas kontakti ŝin ĉe liquidfireangel@gmail.com.

Kiel frenezaj monatoj por ni ĉiuj! Vi certe jam legis, ke la Universala Kongreso en Montrealo ne okazos ĉi-somere. Pro tio, ni nun diskutas eblon starigi ian retan kongreson nome de Esperanto-USA. Se vi volus prezenti ian prelegon aŭ gvidi sesion ĉe reta kongreso, bonvolu sendi mesaĝon al la estraro pri via ideo.



Plue, ni jam prizorgas retajn eblojn por la balotado de Esperanto-USA por la nuna jaro. Atendu pli da informoj pri ankaŭ ĉi tio.

Dumtempe, mi ankaŭ al kutimiĝas al la novaj metodoj por instruistoj. Mi nun instruas miajn kursojn rete, per Google Meets kaj Google Classroom kaj multe da retroŝtoj. Bonŝance, mi jam kutime uzis tiajn rimedojn. Parenteze, dankon por resti hejme, ĉar triono el miaj lernantoj havas tre altan riskon pri la nuna pandemio. La fermado de ĉio estas por helpi al miaj karaj lernantoj kaj homoj kiel ili. Mi tre zorgas pri ilia sano – kaj mensa kaj korpa – kaj pri via ankaŭ. Restu sanaj kaj sekuraj kaj hejme.

— Charlotte BURTON

New Treasurer

After a stint on the Board of Directors from 2018 to 2019, I've remained an active volunteer with Esperanto-USA, and in March the Board appointed me to replace outgoing Treasurer Murray Merner. Little did we all know the grave situation that lay ahead. What an interesting time to be placed in charge of a nonprofit's finances.



Fortunately, according to the latest indications, Esperanto-USA has been little affected by the instability that's rocking financial markets. The funds you've entrusted to us, whether you're a new Duolingo learner or a decades-long life member, remain solidly in place. Thanks to you, and to the careful planning of Treasurers gone before, we will continue our mission of promoting Esperanto in the US in 2020 and beyond.

In my new role I'll be working closely with Bill Harris, Director of the Central Office. In accordance with our bylaws, the Director of the CO has long been entrusted to receive and disburse funds under the Treasurer's oversight. Bill works hard to manage E-USA's day-to-day operations, and I look forward to collaborating with him in this new capacity.

I'd like to thank Murray Merner for his outstanding work as Treasurer and for his efforts to ensure an orderly transition. He and Bill have taken the time to explain everything I needed to know to get started with the job. I wish Murray the best of luck in his endeavors.

What's more, I look forward to serving you again as a member of the Board of Directors. If you have any questions or concerns about Esperanto-USA, you can contact me directly at jordon@kalilich.com, or you can contact the Board at board@esperanto-usa.org.

— Jordan KALILICH, Treasurer

Regionoj

Fred estas unu el la Direktoroj de E-USA. Oni povas kontakti lin ĉe f3meyer@gmail.com.

La Regionaj Kunordigantoj/Helpantoj de Esperanto-USA denove kunvenis per Zoom dum Aprilo. La fonduso Esperantic Studies Foundation provizis la Zoom-kunvenon. Ni bonvenigis du novajn kunordigantojn: James BRIDGE por la regiono



“Grandaj Lagoj”, kaj John DUMAS por la regiono “Okcidento kaj Pacifiko”. Mi volas danki ilin pro ilia volontulado.

Ni diskutis niajn penojn ĝisdatigi la liston de kontaktuloj kaj lokaj grupoj en la retejo de Esperanto-USA. La nomoj de kelkaj estis forigitaj pro

tio ke la kunordigantoj ne ricevis respondojn al siaj petoj konfirmi la kontaktan informon. La kunordigantoj planas denove kunveni en Junio. Se vi volas esti kontaktulo por iu loka grupo, bonvolu komunikiĝi kun la kunordiganto de via regiono.

— Fred MEYER, III

Get to Know a Fund

The Goldman Educational Fund

de la estraro • Jordon KALILICH

Esperanto-USA’s monetary assets are divided into various funds, each with a stated purpose. Funds exist to publish literature, promote education, publicize Esperanto, and more. In this column I’d like to talk about the recent activities of one of those funds, the Goldman Educational Fund.

Last year, E-USA kicked off its *Esperanto in the USA* fundraising campaign and had to determine which fund should receive the proceeds. The goals of the campaign include developing youth leaders, helping young Esperantists to travel to events, and developing a strong regional support network for local groups. The Board of Directors determined that the Goldman Fund, whose purpose is to provide general financial support for educational needs, would be a good destination.

In 2019, the Goldman Fund received over \$20,000, much of which came from your generous contributions to the Esperanto in the USA campaign and Esperantic Studies Foundation’s matching contributions. In turn, the Goldman Fund was able to support the development of a number of Esperantists and Esperanto events around the country.

Last spring, the fund provided a grant to support the second annual *Printempa Esperanto-Renkontiĝo* (PER) in Valle Crucis, North Carolina. The fund later covered all or part of eight people’s registration

expenses for Esperanto-USA’s *Landa Kongreso* in Boston, Massachusetts, and recently allowed one person to attend the first *Sudokcidenta Renkontiĝo Esperantista* (SORE) in Mesa, Arizona.

The Goldman Fund also covered a significant portion of the expenses for *Vintra Esperantista Klerigado* (VEK), a training for USEJ volunteers that saw guests from Italy and Canada. You can read more this and the other events in recent issues of *Usona Esperantisto*.

Thanks to the continued generosity of Esperantic Studies Foundation, the Esperanto in the USA campaign will proceed in 2020, giving the Goldman Fund additional opportunities to support Esperantists and Esperanto events during what has turned out to be a difficult time for many.

To request a grant from Esperanto-USA or to learn more about our funds, go to the **Documents** section of our website, under **About Us**.




Jordon KALILICH

Jordon is Treasurer of Esperanto-USA. He lives in Seattle, Washington.

jordon@kalilich.com

Kiel nomi tiun viruson?

facila teksto



Ĉu *koronaviruso*, *koronaviruso*, aŭ *kronviruso*?

Ĉi tiu **viruso** estas preskaŭ la sola afero pri kiu ni ĉiuj parolas kaj pensas dum monatoj.

Sed kiel nomi ĝin en Esperanto? Sciencistoj preferas la nomon *koronaviruso*, ĉar tio estas la internacia scienca nomo, jam uzata en multaj lingvoj (tamen per malsamaj skribistoj). Fakte ekzistas multaj specoj de viruso, ekzemple *enteroviruso*, *rinoviruso*, *rotaviruso*, kaj aliaj. La viruso, pri kiu ĉiuj parolas (kaj kiu nun kaŭzas tutmondan malsanon) apartenas al la familio de la koronavirusoj. Ekzistas tamen multaj aliaj specoj de koronaviruso: kelkaj specoj estas tre danĝeraj; kelkaj kaŭzas nur simplan **malvarmumon**.

Se vi volas uzi la sciencon nomon, rimarku, ke *koronaviruso* estas unu vorto. La unua parto *korona-* aspektas kiel **adjektivo**, sed fakte ĝi estas parto de la radikilo. La vorto estas nedividebla.

Intertempe, la esperantistoj, kiuj plejparte ne estas sciencistoj, diskutas kiel nomi tiun viruson en Esperanto. *Corona* estas la **latina** vorto por “krono” (kapvesto de reĝo aŭ reĝino), do multaj esperantistoj nomas ĝin *kron-viruso*.

En Esperanto ekzistas ankaŭ la vorto *korono*. Ĝi nomas la gason ĉirkaŭ la suno, kiun oni normale

vidas nur dum tuta **eklipso**. Fakte, ankaŭ la vorto *korono* venas de la sama latina vorto *corona*, ĉar ĝi ĉirkaŭas la sunon kiel krono. En pluraj eŭropaj lingvoj “krono” kaj “korono” estas la sama vorto, ekzemple en la itala, hispana, franca, pola, kaj aliaj.

La **Akademio** de Esperanto diskutas, kiel nomi tiun viruson en Esperanto. La plejmulto estis dividita preskaŭ egale inter *kron-viruso* kaj *koron-viruso*. (La malgranda grupo de sciencistoj, aliflanke, preferis la sciencon nomon *koronaviruso*.) Finfine, do, la Akademio ne rekomendis unu el la du formoj, sed anoncis, ke ambaŭ estas uzablaj. Nur post iom da tempo ni ekscios, kiun el la du formoj preferas la plejmulto de la esperantistoj.

Ofte okazas, precipe rilate al sciencaj aferoj, ke por la sama afero ekzistas kaj popola nomo kaj scienca nomo: ekzemple, salo nomiĝas ankaŭ *natria klorido* (NaCl), kaj la floreto miozoto nomiĝas ankaŭ *neforĝesumino* (ne-forĝesu-min-o). Ankaŭ tiu viruso, pri kiu oni nuntempe paroladas en ĉiu gazeto, iom post iom ricevas sian popol-nomon en Esperanto.

Kiam la tutmonda malsano finiĝos, kaj ni ĉiuj rajtos reiri al la normala vivo, ni eble ne plu bezonos tiun vorton. Tiam la sciencistoj denove povos paroli inter si pri la *koronaviruso*, uzante sian preferatan sciencon nomon.

Klarigoj

adjektiv/o

Vorto, kiu finiĝas per *-a* en Esperanto, kiu montras econ aŭ kvaliton, ekzemple *granda*, *bona*.

akademi/o

Oficiala asocio de verkistoj, artistoj, sciencistoj aŭ simile, kiuj renkontiĝas por interŝanĝi ideojn kaj, se necese, fari rekomendojn pri la propra scio-kampo.

eklips/o

Okazo, kiam la luno parte aŭ tute kaŝas la sunon, aŭ kiam la Tero pasas inter la suno kaj la luno, tiel ke la suno ne lumigas la lunon.

Latin/o

La lingvo parolata de la Romanoj antaŭ multaj jarcentoj. Ĝi estas la antaŭulo de la modernaj itala, hispana kaj franca lingvoj. Oni nun uzas Latinon por krei sciencajn nomojn.

malvarmumo

(*mal-varm-um-o*) Negrava kaj tre ofta malsaneto de la spir-sistemo, pli ofta dum malvarma vetero.

virus/o

Trege malgranda kaj nevidebla portanto de malsano.

Adaptita (kaj eĉ iom pli faciligita) el facila artikolo de Anna LÖWENSTEIN ĉe **uea.facila**

<<https://uea.facila.org>>.

Ne forgesu mian voĉon

libroj



Ĝus aperis nova libro de la konata verkisto Julian MODEST. Ĝi prezentas du novelojn:

En “Ne forgesu mian voĉon” estas amo, sekretoj, mistero. La pentristo Veselin kaj la ĵurnalistino Milena renkontiĝas, konatiĝas, ekamas unu la alian, sed ilia amo ne daŭras longe. Subite Milena malaperas. Iu verŝajne murdis ŝin. Veselin vane serĉas ŝin. Restas nur la rememoroj pri Milena kaj la sola deziro de Veselin neniam forgesi ŝian voĉon.

En “Aŭtuna ferio” la ĉefheroo Martin estas talenta verkisto. Por finverki sian novan romanon li iras en belan maran ripozejon, luas hotelan ĉambron, esperante, ke en silento kaj trankvilo li daŭrigos la verkadon. Tamen tie li renkontas allogan enigman junulinon kaj okazas kelkaj strangaj eventoj.

En la literatura retejo *OLE* jam aperis **recenzo de la libro** <<http://esperanto.net/literaturo/novel/novlibr/forgesvocre.html>>.

Ne forgesu mian voĉon ĉe **Amazon** <<https://amazon.com/dp/0244561818>>; ĉe **UEA** <<https://katalogo.uea.org/?inf=9773>>. Julian Modest. 104 paĝoj. Eldonejo Libera, 2020. ISBN 9780244561819.

Traduki el Esperanto povas esti surprize defie

traduku! • HOSS FIROOZANIA

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. Leginte viajn respondojn, ni faros resumon de la diversaj provoj, kune kun reagoj, komentoj, kaj proponoj.

Kion vi opinias? Ĉu estas pli facile traduki el la angla en Esperanton, ol inverse? La angla ja estas la pli komplika lingvo. Ĝi svarmas je malfacilaĵoj: gramatikaj esceptoj, strangaj idiomaĵoj, kaj sinonimoj kun nuance malsamaj sencoj. Certe, povas esti granda defio fidele kaj flue kapti la esencon de angla teksto en nia relative simpla, regula lingvo.

Do, ĉu traduki el Esperanto en la anglan estas pli facile? Ne nepre. Paradokse, malgraŭ ĝia riĉa esprimovo (aŭ eble danke al ĝi), la angla estas ege malfacila traduklingvo. Same kiel aliaj etnaj lingvoj, ĝi estas aparte sentema pri stilo: eĉ se traduko en la anglan bone kaj gramatike kaptas la signifon de originala verko, ĝi povas ankoraŭ soni tro “fremda” – alivorte, ne kiel io, kion denaskulo efektive dirus. Sekvas do dilemo por la tradukanto: ĉu konformigi tradukon al “natura” anglalingva stilo, por ke ĝi legiĝu kvazaŭ la aŭtoro estas denaska anglalingvano, aŭ ĉu lasi ĝin pli “fidela” sed fremdsona?

En sia eseo *Natura traduklingvo* (aperinta en la libro *Pajleroj kaj stoploj*), la skota tradukisto William AULD skribis: “[P]ere de la angla lingvo mi devas elekti inter tradukoj poluritaj kaj laŭeble anglecaj, kaj tradukoj, kiuj malgraŭvole emfazas la fremdecon de la originaloj.” Por Auld, nur Esperanto povis kapti la apartecon de fremda teksto sen sentigi ĝin “fremda”.

Nu, ĉu helpas, se la aŭtoro de Esperanta teksto estas mem denaska anglalingvano? Foje Esperantaj verkistoj ja sekvas la ritmojn kaj parolturnojn de siaj denaskaj lingvoj, ĉu konscie aŭ ne. Tradukanto en la anglan eble povas profiti, se Esperanta teksto havas stilon aparte anglecan, kaj tiel facile enangligeblan.

La aŭtoro de nia pasintnumera defio-teksto, Marjorie BOULTON, ja estis denaska parolanto de la angla, kaj ege klera pri tiu lingvo; efektive, dum jaroj ŝi instruis pri angla literaturo. Sed ŝi estis ankaŭ majstra uzanto de Esperanto, lerte utiligante en ĝi rimedojn, kiuj ne ekzistas en la angla. Rezulte, ŝiaj frazoj, kvankam

elegantaj kaj esprimriĉaj en Esperanto, en tro laŭvorta anglalingva traduko povas soni neglataj kaj fremdaj. Kaj ĝuste tial mi elektis ŝian tekston – por ~~turnas~~ defii niajn kompatindajn tradukintojn ...

Mi kore dankas al SD kaj BS, kiuj ambaŭ baraktis tre brave. Ili kontribuis du imponajn, kreemajn, kaj tre ĝuindajn solvojn. Plejparte ili sekvis similajn alirojn al la teksto, redonante tradukojn tre fidelajn. Jen kelkaj el la plej interesaj esprimoj kaj parolturnoj, kie ili foje trovis malsimilajn solvojn:

io detenis lian manon – *something had stayed his hand* (bone konservas la metaforon, kiu feliĉe ekzistas ankaŭ en la angla, sed ĉu ĝi eble sonas iom arĥaika?); *something prevented him*.

ia sufoka premado malkuraĝigis lin – *a sort of suffocating pressure that sapped his confidence; discouraged him*.

nervmuela, temporaba pangajna laboro – *nerve grinding, time consuming work to earn a living; long, soul-crushing days of subsistence work*.

multjara malsato eble vivdetrua – *possibly health destroying hunger over the years; years-long, even life-threatening hunger*.

eĉ kredita saldo ĉe la banko – *even a credit balance at the bank; even a positive balance in his bank account*. Ambaŭ bonaj tradukoj, sed jen okazo kie tro laŭvorta aliro povas soni iom balasta. Kion denaska anglalingvano dirus? Ĉu eble: *even money in the bank?*

turnas la dorson al la laboriloj – *turned away from his tools; turned his back on the tools of his craft*.

Li penadis konvinki sin denove – Boulton utiligis la sufikson *-ad*, kiu kutime postulas apartan vorton en la angla, kaj la radikon *pen-*, kies ekvivalentoj eble sonas tro pezaj ĉi tie (ekz. *endeavor*) aŭ tro banalaj (ekz. *try*). Niaj tradukintoj elektis: *he kept trying to convince himself again*, kaj: *he strove again to convince himself*.

la vortoj de la malamikoj sonadis kaj resonadis en lia kapo – *the hateful words kept sounding and resounding in his head; the words of his enemies echoed and re-echoed in his head.*

escepte forta kapablo mense bildigi pasintajn kaj fantaziajn aferojn – *an exceptionally strong ability to mentally picture past and fanciful things; his unusually strong ability to form mental images of things past or possible.*

maldiklipaj, mortokulaj negativaj vizaĝoj – *tight lipped, dead-eyed, negative faces; thin-lipped, dead-eyed, disapproving faces.*

Li revidadis tiun ombrelopinton, kiu kun ŝira bruo vundis lian nudan belulinon – *He kept seeing that umbrella point which, with a ripping noise wounded his nude beauty; [He] saw again the tip of the umbrella, heard again the tearing sound as it pierced his beautiful nude.*

Ekscititino – Jen titolo de pentraĵo, kiu abstrakte bildigas nudan virinon en volupta, ama stato. Estas malfacile redoni ĝin en konvena angla formo. La laŭvorta *Excited Female* verŝajne ne konvenas. Unu el niaj tradukintoj rezignis pri ĝi; la alia elektis *Nude, Aroused*. Ĉu eble ankaŭ *Ecstasy? Rapture?*

ŝiaj en kvadratojn kristaliĝintaj mamoj – Jen tre esprimpova metaforo, malfacile redonebla, kaj cetere kun komplika gramatiko. Supozeble la artisto pentris virinon en “kubisma” stilo, kun korpopartoj abstraktaj kaj ortangulaj. (Pensu pri Picasso, ekzemple.) Unu tradukinto elektis: *her breasts crystallizing into squares*; la alia klarigis la metaforon: *the abstract squares of her breasts*.

enkarnigita kontraŭvivemo – Jen eble la plej defia esprimo en la teksto. Ĝi bunte kaj koncize prezentas la opinion de la ĉefrolulo pri siaj kritikintoj. Ĉu entute eblas esprimi la saman ideon nature kaj same koncize en la angla? Unu elektis: *embodied sentiment against life*; la alia donis: *nihilism incarnate*.

Kaj jen traduko sinteza, farita el tiuj partoj de la kontribuoj kiujn mi taksis (nur laŭ propra gusto, kompreneble) plej interesaj:

Leo kept pacing in his studio. More than a

hundred times now he'd set himself to work, but something prevented him: a sort of suffocating pressure that sapped his confidence. He had good brushes and supplies of various types of pencils for sketching; the light in the studio was quite good; many young artists, struggling against indifference, forced to choose between soul-crushing, time-consuming days of subsistence work or years of possibly life-threatening hunger, would surely envy him. That he knew. At fifty-two, he now had a comfortable home, quality tools, even a positive balance in his bank account. His paintings already were found in many museums in various countries. Several books had already been written about him.

But still, that day, as Leo paced, trying to force himself to work, he heard the cruel words again, and again he turned away from his tools. He kept trying to convince himself that the disapproval of a certain sort of people, their offending words, are an almost mathematically accurate proof of the superiority of those they criticized. But the hateful words echoed and re-echoed in his head. With his exceptionally strong ability to mentally picture things past or possible, he saw again and again the tight-lipped, dead-eyed, disapproving faces of that couple in the art gallery. He saw again the tip of the umbrella, which with a tearing sound had wounded his beauty, *Nude, Aroused*, with her breasts of abstract squares. This episode of incarnate nihilism made it impossible for him to work, almost robbing him of coherent thought.

La sinteza traduko kaptas la sencojn de la vortoj, kaj fidele sekvas la frazkonstruon kaj vortordon de la originalo. Sed ĉu ĝi donas impreson de “natura” anglalingva teksto? Plejparte jes, almenaŭ laŭ mia orelo – sed eble ne tute.

Kiel aspektus tekston eble pli “natura”, eĉ se malpli fidela? Por tio mi turniĝis al Tim WESTOVER, sperta verkisto de multaj jaroj en kaj Esperanto kaj la angla lingvo. Mi sendis al li iom laŭvortan tradukon, kiun mi faris pasintjare, kaj petis ke li traktu ĝin kiel sian propran verkon, redaktante ĝin tute senkonsidere al la originalo. Jen la rezulto:

Leo paced in his studio. He had tried getting back to work many times now, but a suffocating

pressure always held him back. He had a well-lit studio filled with fine brushes, drawing pencils, and other tools of his trade. Plenty of young artists would envy him; he knew from his own experience their struggles with indifference, being made to choose between the grind of earning one's daily bread, or the years of poverty and hunger that come with fully devoting oneself to art. At fifty-two, he now had a comfortable house, quality supplies, even money in the bank. His paintings were in museums around the world. Books had been written about him.

But on that day, Leo paced. Cruel words echoed in his head, forcing him to turn away from his work. He'd tried convincing himself that disparagement and abuse can be proof of one's superiority—at least where some critics are concerned—but still, the slurs haunted him. With his artist's eye for visualization, he saw again the thin-lipped, dead-eyed faces of that cynical couple in the art gallery. He saw the tip of the umbrella tearing through his *Ecstasy*, the beautiful nude with cubic crystal breasts. And that memory, its lurid destruction, denied him the ability to think clearly, much less work.



Kaj jen la nova tradukdefio. Denove temas pri teksto en Esperanto; via tasko estas provi traduki ĝin en la anglan. (Tiel alternos la defioj ekde nun: en unu numero aperos teksto por *elangligi*, en la sekva, teksto por *enangligi*.) Ĉar la tradukdefioj estas foje longe kaj/aŭ malfacilaj, **vi ne devos traduki la tuton**; kompreneble mi kuraĝigas vin voreme ataki la tutan tekston, sed mi ĝoje akceptos ankaŭ fragmentojn. Do ne hezitu provi!

La ĉi-numera teksto estas senkompate mallongigita eltiraĵo el la klasika romano *Ombro sur interna pejzaĝo* de kroata verkistino Spomenka ŜTIMEC (Pisa:

Edistudio, 1996. 2-a eldono. pp. 13–15):

Li laciĝis de nia kunvivado. Mi ne. Jen la tuta saĝaĵo.

lun matenon vekigis fremdulo sur mia kuseno. Lia kiso enpenetris nur tra la plej maldika tavolo de mia haŭto. Li ekmalĉeestis. Unue li komencis malaperi tiel. Poste li ankaŭ fizike foriros.

Mi emis veni hejmen. Ĉe la enmeto de la ŝlosilo enseruren, mi jam sciis, ke mi trovos la domon malplena. Li dum la lasta tempo emis vagi ien. Kaj eĉ kiam li ĉeestis, li ne ĉeestis. Tiam la voĉo, por gajigi la vesperon, lanĉis tiun diagnozon:

– Li ekmalĉeestas! Ekmalĉeestas! Vidu kiel bela vorto! Kvazaŭ azteka! – Mi devis rideti pri la klopodoj de mia voĉeto. Tio estis kvazaŭ karesprovo. Sed ĝia spritaĵo mallonge daŭris. La tristo kapablis reinvadi.

Ĉu al li ŝajnis ke jam ĉio okazis? Ĉu lin ĝenas ke mi scias tro pri li? Mi konis pli bone ol li la repertuaron de liaj ŝercoj kaj kapablis foje memori lin, dum estis lia vico por rakonti. Ĉu tio estas signo de disfalo?

Foje ni parolis pri unuaj amoj. Mi devis korekti lin: pardonu, vi transaltis la japaninon. – Kiun japaninon? – Tiun kiam vi estis soldato! – Fakte, vi pravas. Mi devos baldaŭ demandi vin kiel nomiĝis la hundo de mia praavino. Ni ridis. Tiumomente tio ŝajnis sprita. Nur poste ĝi doloris.

Kial mi estis pli eltenema ol li? Ĉu ĉar nian rilaton antaŭis jaroj de soleco dum kiuj mi akumulis neelĉerpeblan paciencon por kunvivado?

La redakcio (trovu la adreson en la kolofono) akceptos vian tradukon **ĝis la 31-a de Aŭgusto**. Ne necesas sendi plenan tradukon, se vi ne kapablas aŭ volas; ni akceptos fragmentojn. Sed ĉiuokaze bonvolu sendi **nur unu** tradukon, ne plurajn diversajn provojn.

Ĉio (card game)

el la arĥivo

In this issue our time machine continues its visit to 1908, the year when the following article appeared in the December issue of *Amerika Esperantisto*. The article describes an instructional card game created by Winifred Sackville Stoner, an educator, prominent Esperantist, and mother of a child prodigy. I've been unable to locate any surviving copies of the game, but the article describes it in sufficient detail to reconstruct it—or something very much like it. —Ed.

The game ĈIO consists of 50 cards with 40 words on each card, making a total of 2,000 words by means of which anyone may carry on an ordinary conversation in Esperanto. From 2 to 50 persons may take part in the game, making it suitable for the classroom as well as the parlor. Ten different games may be played with one set of ĈIO cards by large classes and 40 games by small parties.

In playing **Game I**, which deals with the table, it is best to have someone who knows Esperanto, act as leader or **Kelnero** (waiter); the other players need know nothing about the language. They pretend that they are in some foreign country and are trying to order a meal in the universal tongue. The **Kelnero** distributes the cards equally among the players and asks the first: **Kion vi havas?** (What have you?) The player replies: **Mi havas supon** (reading the first word on his card, after leader has explained the objective ending). Then, if possible, player translates this word into English. If he does not know its meaning, his right hand neighbor gets a chance and so on down the line until someone answers correctly and receives the card. Then the **Kelnero** asks all the players **Kion vi deziras?** and they answer **Mi deziras supon**. The leader continues asking for cards and the players reading the first word on each card until all have been translated, when first prize is awarded to the one holding most cards.

An order for a meal is then written from memory by each one. These orders, which are sometimes very

amusing, are read aloud and the one who orders the largest meal wins second prize.

After playing this game but one evening, anyone can ask for the ordinary articles of food and, with a good leader, be conversant with the expressions used at the table.

If no Esperantist leader is available, parties may play the game with the assistance of an Esperanto-English Vocabulary.

Game II., referring to the body, diseases, and remedies, is played in the same way; the leader calling himself **Kuracisto** (doctor) and the others acting as patients. Prizes awarded to those who have the most diseases or can suggest greatest number of remedies.

Game III. Leader is merchant, others shoppers.

Game IV. Leader is King or Mistress of a house; others visitors and subjects, who tell what they see in house or street, or the occupation they follow.

Game V. Leader gives nouns, others supply adjectives.

Game VI. Leader gives nouns, other supply verbs.

Game VII. Leader acts as naturalist and asks for names of birds, animals, insects, flowers and trees.

Game VIII. Leader is teacher and asks for names of relations, months, days of week, time, weather, festivals, numerals.

Game IX. Leader is teacher and asks for adverbs, prepositions, conjunctions, and verbs.

Game X. Leader is teacher and asks for names relating to religion, travel, occupation, and interjections.

La vivo de Peĉjo

Ĥercoj • Timothy BORONCZYK



Lekato

senintenca esperantaĵo • HOSS FIROOZLIA



La firmao *Lekato* vendas diversajn ilojn al muzikistoj, ekzemple la jenan agordilon por kordinstrumentoj. (Espereble ĝi estas akvoimuna ... aŭ almenaŭ salivimuna.)

Tre atentaj legantoj eble memoras, ke en 2016 ni prezentis la firmaon *Leki*, kiu vendas marŝbastonojn. Kaj nun, finfine, alvenas la lekato. Sed kie estas la lekato?

Kolofono

Redaktoro / Editor: HOSS FIROOZLIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Bonvenaj estas kontribuoj kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton. Kun aliaj fotoj aldonu notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte senditajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas reuzebla laŭ la permesilo CC BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.en>>. Ni petas, ke oni tamen atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuantoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, address, and photo. With other photos please include the photographer's name along with subject(s), location, and date. We will return mailed contributions if you include a self-addressed, stamped envelope.

The contents of *Usona Esperantisto* may be reused under the Creative Commons Attribution-Share Alike license <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. We ask that you wait two months before reprinting the latest content, however.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.